WIKIPEDIA

Malsuprasoraba lingvo

La **malsuprasoraba lingvo** (malsuprasorabe *dolnoserbšćina*, germ. *Niedersorbisch*, pol. *dolnołużycki*, ĉeĥ. *dolní lužická srbština*) estas okcidentslava lingvo, kiu estas parolata en Malsupra Luzacio, en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Chóśebuz (germane *Cottbus*).

Dulingva germana-malsuprasoraba ŝildo en Cottbus.

Malsuprasoraba	
Dolnoserbšćina	
Parolata en	Germanio
Regiono	Malsupra Luzacio
Parolantoj	14 000
Skribo	Latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Slava lingvaro	
Okcidentslavaj lingvoj	
Soraba lingvaro	
Malsuprasoraba	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Malsupra Luzacio (Brandenburgio/Germanio)
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	dsb
ISO 639-3	dsb
SIL	dsb (http://www.sil.org/iso639-3/codes.asp?order=639_3&letter=od)
Glottolog	lowe1385
Angla nomo	Lower Sorbian
Franca nomo	bas-sorabe
Vikipedio	

Enhavo

Fonetiko
- Vokaloj
- Konsonantoj

Malsuprasoraba alfabeto

Lingvaj monumentoj

Eksteraj ligiloj
- Vortaroj
- Aliaj ligiloj
- Fontoj

Fonetiko

La malsuprasoraba lingvo distingiĝas per kelkaj specifaj sonaj evoluoj kaj apartaĵoj, per kiuj ĝi diferencas de aliaj okcidentslavaj lingvoj.

Vokaloj

- *ę > *ě* (sub akcento, ekz.: *měso, rěd, pěś*) resp. 'e (ekster akcento, ekz. *śele*)
- 'e > *'a* (*wjas, njamaš*)

- *tṛt > *t'art* (*kjarcma, gjarnc*)
- *o* (post labialoj kaj velaroj, kiuj ne staras antaŭ labialoj resp. velaroj, ĉiam sub akcento, kelkfoje ankaŭ ekster akcento) > *ó* (en dialektoj malsame prononcata kiel *e*, *y* aŭ *ó*, ekz. *gora > *góra* [*gera, gyra, góra*].

Konsonantoj

- *ť, *ď > ś, ź (*śerpjeś, źěd*)
- konservita *"g" (ekz. *góra, glědaś, guska*)
- konservita palatala *ŕ* (parte ankaŭ kiel fina sono, ekz. *buŕ*, *ceptaŕ*)
- malmoliĝo de *"š", *"ž" (ekz. *šyroki, žyto*)
- ŝanĝiĝo *č* > *c* ("mazurado" (sorabe mazurěrowanje), ekz. *cas, cesto, cytaś*)
- *kŕ, *pŕ, *tŕ > *kś, pś, tś* (*kśikaś se, pśěza, tśi*)
- *kr, *pr, *tr > *kš, pš, tš* (*kšej, pšawy, tšawa*)
- simpligo de la grupo *str > *tš* (*sotša, wótšy*)
- konservo de la grupo *stŕ kiel *stś* (*stśělaś, stśigaś*)

Malsuprasoraba alfabeto

Malsuprasoraba alfabeto																																
a	b	c	č	ć	d	e	ě	f	g	h	ch	i	j	k	ł	l	m	n	ń	o	p	r	ŕ	s	š	ś	t	u	w	y	z	ž	ź
A	B	C	Č	-	D	E	-	F	G	H	Ch	I	J	K	Ł	L	M	N	-	O	P	R	-	S	Š	Ś	T	U	W	Y	Z	Ž	Ź

Lingvaj monumentoj

La plej malnova granda lingva monumento de la malsuprasoraba lingvo estas manskriba traduko de la Nova Testamento fare de Mikławš Jakubica el la jaro 1548. La unua presita malsuprasoraba libro estas malsuprasorabaj kantaro kaj kateĥismo de Albin Moller el la jaro 1574. Pliaj gravaj lingvaj monumentoj estas "Enchirideon Vandalicum" de Handrij Tara (1610) kaj manskriba gramatiko de Jan Chojnan (1650).

Eksteraj ligiloj

Vortaroj

- www.dolnoserbski.de - Germana-malsuprasoraba vortaro en la reto (http://www.dolnoserbski.de/dnw/index.htm) germane, malsuprasorabe
- Korpus GENIE (http://www.coli.uni-saarland.de/genie/)

Aliaj ligiloj

- Malsuprasoraba radioprogramo (http://www.rbb-online.de/radio/sorbisches_programm/sorbisches_programm.html)

Fontoj

Muka, E., Historische Laut- und Formenlehre, Lipsk, 1891.
Serbski rěčny atlas, zwjazki 1–15. (laŭ la suprasoraba vikipedio)

Slava lingvaro		
Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)	
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...	
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†	

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Malsuprasoraba_lingvo&oldid=5933907"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 11:42, 7 maj. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.